

ĈEA-retkomunikoj 1/2012

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

Enhavo:

1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO
2. GOOGLE EKTRADUKAS ESPERANTON
3. ALVOKOJ
4. AKTUALAĴOJ
5. NOVAJ ARTIKOLOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ
6. ĈEJ AKTIVAS
7. LISTO DE ARANĜOJ
8. BONDEZIROJ

1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO

Venis finfine printempo, venas finfine ankaŭ ĈEA-retkomunikoj. Jes, post kvar-monata paŭzo vi povas denove ĝui novan eldonon de ĈEA-retkomunikoj. Ankaŭ tiu ĉi eldono aperas en PDF - elŝutu el <http://www.esperanto.cz/soubory/retkomunikoj-2012-01.pdf>

2. GOOGLE EKTRADUKAS ESPERANTON - La 22-an de februaro 2012 aperis en la oficiala anglalingva blogo de la teamo de la servo Google-Tradukilo novaĵo pri tio, ke ekde nun oni povas per ĝi traduki ankaŭ al aŭ de Esperanto. Malgraŭ tio, ke por Esperanto la maŝino ne havis multe da trejnmaterialo kaj la tradukado okazas pere de la angla, la kvalito de la Esperantaj tradukoj estas laŭ Google superaveraĝa kaj oni povas supozi, ke en la estonteco ĝi ankoraŭ pliboniĝos, ĉar la uzantoj povas korekti erarojn kaj tiel kontribui per pli kvalitaj tradukoj. Pri tiu ĉi novaĵo aperis multaj anoncoj kaj reagoj, ni ĉi tie menciis almenaŭ la tekston kiu aperis en la paĝo [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/google-ektradukas-esperanton.html), do bonvolu viziti <http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/google-ektradukas-esperanton.html>.

3. ALVOKOJ

3.1 ENKETO PRI INFORMADO KAJ RICEVADO DE STARTO

Ni petas ĉiujn, kiuj ankoraŭ ne reagis al nia enketo pri informado aperigita en 2011/4, bv. skribi al la ĈEA-estrarano

Vratislav Hirš - vhirsx@email.cz.

Kompletan demandaron vi povas elŝuti en

<http://www.esperanto.cz/eo/cxea-interne>.

Temas pri 5 simplaj demandoj, gravas precipe via preferoj koncerne ricevadon de Starto (ĉu elektronika, ĉu papera).

Aparte dumvivaj membroj (F-membroj), kiuj deziras plu ricevadi Starton paperforme, estas petataj konfirmi al supra adreso sian aktualan poŝtadreson!

Kaze de nekonfirmo por ili disponeblos plu nur interreta versio

<http://www.literatura.bucek.name/starto/starto.html> kaj ni konsideros tion signo de ilia ekonomia subteno de la asocio.

Al tiu ĉi paŝo kondukas nin krome supozeble nemalalta nombro de F-membroj, kiuj ne plu interesiĝas pri Esperanto kaj presado de neuzataj ekzempleroj superflue ŝarĝas nian budĝeton.

Ŝparitan monon ni prefere uzos por aliaj projektoj por vi.

Ni antaŭdankas por via komprenemo kaj reago.

3.2 NI SERĈAS MATERIALOJN POR NOVA EKSPozICIO

La 2-an de junio estos inaŭgurita nova tutjara ekspozicio kun ĝenerala temo „125 jaroj de Esperanto“. Por ĝi ni aparte serĉas interesajn historiajn materialojn ankoraŭ ne prezentitajn (precipe pli ol 50 jarojn aĝajn) – fotoĵojn, bildkartojn, eldonaĵojn, tridimensiajn objektojn ktp. Parto estos rekte ekspoziciata kaj parto estos prezentata en virtuala formo en interreto kaj en la muzea tuŝekrano. Provu serĉi en via persona aŭ kluba arkivo!

Kun via aktiva partopreno nia ekspozicio estos pli riĉenhava!

Bv. skribi vian proponon por pruntedono al Pavla Dvořáková pavla.esperanto@gmail.com.

Antaŭdankon por via kunlaboremo! Ni garantias bonordan redonon post fino de la ekspozicio.

3.3 KOMPUTILA KONSULTEJO

Ni pretigas novan rubrikon en nia asocia retejo por altigo de ĝeneralaj komputilaj kapabloj.

Por ke ĝi plenumu bone sian funkcion, ni petas:

1) Ĉu vi havas konkretan demandon, problemon pri komputilumado, pri kiu vi volas konsili?

2) Ĉu vi spertas pri komputiloj kaj pretas laŭ viaj scioj kaj tempobloj respondi?

Se al 1) aŭ 2) vi respondas JES, bv. skribi al miropiro2312@gmail.com.

La unuaj du artikoloj pri skribado de diakritiko kaj pri Skajpo venos jam baldaŭ!

3.4 TAJPANTOJ KAJ PROVLEGANTOJ SERĈATAS!

Ni posedas en manuskriptoj diversajn valorajn tekstojn (literaturajn, fakajn, instruajn), kiuj atendas sian enkomputiligon. Ĉu vi volas helpi alirebligi ilin al Esperanto-mondo?

1) Ĉu vi scipovas tajpi en Word kaj pretus retransskribi interkonsentitajn materialojn?

2) Ĉu vi bone regas Esperanton kaj havas „kritikan okulon“ kaj pretus kontroli la tekstojn kaj korekti en ili event. tajperarojn?

Se al 1) aŭ 2) vi respondas JES, bv. skribi al malovec@volny.cz

Antaŭdankon por via volentemo!

3.5 VENU AL TUTŜTATA RENKONTIĜO DE KOLEKTANTOJ

En Břeclav okazos sabate, la 28-an de aprilo 2012 renkontiĝo de kolektantoj. Vi havos ŝancon aĉeti diversajn medalojn, monerojn, telefonkartojn, sed ankaŭ tiel prezenti kaj eventuale vendi viajn proprajn diversajn materialojn el vojaĝoj kaj tiel helpi al disvastigado de ideo de esperanto. En kazo, ke vi volus veni, skribu al Vladislav Hasala: vlada.hasala@seznam.cz

3.6 HELPU NIN KUNE KREI STARTON, RETKOMUNIKOJN KAJ ĈEA-RETEJON!

Ambaŭ periodaĵoj troviĝas en interreto:

Nova numero de Starto 2012/1 en <http://www.literatura.bucek.name/starto112.pdf>

Arkivo de Retkomunikoj en <http://www.esperanto.cz/eo/cxea-interne/arkivo-de-retkomunikoj>

Ne forgesu, ke ili estas nia KOMUNA komunikilo. Ĉu vi ion malhavas en ili aŭ pri io ne kontentas?

Tiam bv. mem kontribui, ni tre ĝojos!

Kontaktadreso:

Starto -->> Miroslav Malovec malovec@volny.cz

www.esperanto.cz kaj www.muzeum.esperanto.cz -->> Pavla Dvořáková

pavla.esperanto@gmail.com

Retkomunikoj kaj Kalendaro de aranĝoj ĉe www.esperanto.cz -->> Miroslav Hruška

miropiro2312@gmail.com

4. AKTUALAĴOJ

Nova ZEO en Svitavy

La 14-an de aprilo 2012 dum la regiona Esperanto-renkontiĝo oni plantos Esperanto-arbon, kiu fariĝos plia Zamenhof-Esperanto-Objekto en Ĉeĥio. Temos pri la ĉeĥa nacia arbo tilio. Kaj la 15-an

de julio, kadre de Internacia Esperanto-Konferenco, ĉe la tilio estos solene inaŭgurita memorŝtono rememoranta tiun gravan Esperanto-eventon.

Stano Marček instruos en Svitavy la konata slovaka instruisto de Esperanto per rekta metodo kaj aŭtoro de la lernolibro "Esperanto per rekta metodo" Stano Marček el Slovakio gvidos kurson de Esperanto en Svitavy (informoj en la ĉeĥa lingvo en la paĝo <http://www.kava-pech.cz/trip-iek-kurs2012-czech.html>) paralele kun la Internacia Esperanto Konferenco de OSIEK pri la temo Sciencfikcio kaj robotoj (detaloj pri tiu ĉi aranĝo ĉi tie: <http://www.kava-pech.cz/iek>). Al tiu grava internacia evento jam aliĝis kvindek da partoprenantoj el 13 landoj kaj dum ĝi estos ankaŭ baptita la noveldonata dramo de Karel Čapek R.U.R., sed la dramo estos ankaŭ prezentita tie en la teatro Trám (Trabo) per ensemblo sub la gvido de la reĝisorino Radka Oblouková.

Per via voĉo subtenu Esperanton en interreta enketo!

La gazeto „More Intelligent Life“ kunlabore kun prestiĝa semajnjurnalo „The Economist“ lanĉis interretan enketon „KIUN LINGVON PLEJ MULTE INDAS LERNI?“. Ankaŭ vi mem povas influi la rezulton per via voĉo kaj subteni tie Esperanton se vi volos! Simple iru al paĝo <http://moreintelligentlife.com/page/what-best-language-learn> kaj sub la teksto estas formularo, en kiu elektu esperanton!

5. NOVAJ ARTIKOLOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ

Ekfunkciis la reta versio de P.I.V.! <http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/ekfunkciis-la-reta-versio-de-p-i-v.html>

Ekzercu Esperanton kaj aliajn lingvojn pere de videofabeloj!

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/ekzercu-esperanton-kaj-aliajn-lingvojn-pere-de-videofabeloj.html>

Kvar voĉoj pri la nuntempa stato de Esperanto <http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/kvar-vo-voj-pri-la-nuntempa-stato-de-esperanto.html>

Aŭdvidaj novaĵoj en nia muzea retejo en Ipernity <http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/a-dvidaj-nova-voj-en-nia-muzea-retejo-en-ipernity.html>

Aktualaĵoj aperintaj nur ĉeĥlingve:

Ĉu ni agordos Eŭropon per himno en Esperanto? <http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/sladime-evropu-hymnou-v-esperantu.html>

Mortis Jindřich Ondráček, honora membro de ĈEA: <http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/zemrel-jindrich-ondracek-cestny-clen-ces.html>

Estis eldonita nova libro de Patro Xaver: <http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/vysla-kniha-od-otce-xavera.html>

Kiel malmultekoste vojaĝi kun Ĉeĥaj fervojoj en jaro 2012?

<http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/metodika-jizdneho-aneb-jak-levne-cestovat-s-cd-v-roce-2012.html>

NOVAĴOJ EN FOTOGALERIO DE MUZEUM.ESPERANTO.CZ

Ĉiuj galerioj troveblas ĉi tie: <http://muzeum.esperanto.cz/eo/galerio>

Plej novaj:

Belaĵoj de Vjetnamio:

Migrado tra Aŭstralio

Al Svitavy ne nur pro Esperanto!

Tradukoj de beletra en Esperanto

Porinfana literaturo en Esperanto

6. ĈEJ AKTIVAS

(oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) renovigis sian estraron, kiam la 10-an de marto en Hořice dum ĉeesto de 10 esperantistoj reelektiĝis Daniel MRÁZEK kiel prezidanto, Dagmar CHVÁTALOVÁ kiel kasistino kaj Barbora ZÁVODSKÁ fariĝis vicprezidantino; la revizian komisionon eniris Marek BLAHUŠ (prezidanto) kaj Jan ŠEBETOVSÝ.

La novjaran renkontiĝon JES en pola Gdańsk (vizititan de Lech WAŁĘSA) ĉeestis 4 ĉeĥoj (Daniel MRÁZEK, Vít MIŠUREC, Tereza SVOJSÍKOVÁ, Vlad DOLEŽAL). Post ĝi komence de januaro gastis kaj hejmkoncertis en Prago la kantisto Kim HENRIKSEN. Komencfebruaran renkontiĝon BIERo de ĈEJ kaj E-mental en Pardubice ĉeestis ĉirkaŭ 10 personoj, inkl. 3 eksterlandanojn. En Brno la 28-an de februaro kvinope kunvenis la loka junulara klubo, kiu refreŝiĝis per novaj anoj el Slovakio kaj Pollando.

Marek BLAHUŠ finis sian bruselan staĝon. La novjaron li festis en internacia grupeto en Hanovro, poste renkontiĝadis kun esperantistoj en Bruselo, Bruĝo, Gento, Matriĥto, Antverpeno, Luksemburgo kaj Loveno, kaj akceptis gastojn italajn kaj ĉeĥan. Fine de sia restado li invite prelegis pri esperanto al 110 EU-tradukistoj en Bruselo kaj Luksemburgo. Februare li eklaboris en Brno, ia. pri la projekto Deutsch.info de E@I, kaj lige renkontis junan esperantiston en Wrocław.

Kun januaro finiĝis la konkurso por novaj Esperanto-lernantoj, kiu ne allogis multajn, iujn premiojn oni ŝajne tamen disdonos. La 20-an ĝis la 22-an de aprilo okazos kunveno en Ostrava, taŭga ankaŭ por novuloj. Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe <http://cej.esperanto.cz/>

7. LISTO DE ARANĜOJ

La plej proksimaj aranĝoj

Aranĝoj en jaro 2012

2012-04-14: Regiona renkontiĝo en Svitavy. Plantado de Esperanta arbo, trarigardo de rekonstruita sportstadiono, inaŭguro de malgranda ekspozicio omaĝe al d-ro Zamenhof kun kultura programo, surprizo. Info: dvor.libuse@seznam.cz

2012-04-14-15: Tutslovakia Esperanto-Renkontiĝo 2012, ĉi jare en Trnava, informoj <http://ter.esperanto.sk/>

2012-04-16-22: PRINTEMPA SEMINARIO EN SKOKOVY (BOHEMIA PARADIZO) - Tradicia aranĝo kun antaŭtagmeza instruado en diversnivelaĵoj kursoj, promenoj, ekskursoj, resanigaj programoj, artateliero k.a. Info: drahotova@esperanto.cz

2012-04-19-22: LA 6-A SABLÁ PRINTEMPO EN SKOKOVY (BOHEMIA PARADIZO) Antaŭtagmezaj seminarioj pri tradukado de ĉiĉeronaj tekstoj, Esperanto en Interreto, realigo de sonregistraĵoj, ekskursaj kaj amuzaj programoj komuna kun Printempa seminario (filmprojekciado, kantado kun gitaro k.a.) Info: pavla.esperanto@gmail.com

2012-04-20-22: Internacia junulara renkontiĝo de Ĉeĥa Esperanto-Junularo kaj Slovakia Esperanta Junularo en Ostrava. Renkontiĝo taŭga ankaŭ por novuloj. <http://mladez.esperanto.cz/?>

[p=916&lang=eo](#)

2012-05-12: Renkontiĝo de la klubo de Šumperk. Bazaj informoj: <http://www.esperanto.cz/eo/akce/renkonti-o-de-klubo-de-sumperk-519.html>

2012-05-19: Infantago en Svitavy, informojn petu de Libuše Dvořáková: dvor.libuse@seznam.cz

2012-06-01-03: Renkontiĝo de IKUE, pli da informoj kaj aliĝilo en la paĝo <http://www.ikue.org/cz/zirovnice/zirovnice.htm>

2012-06-02-03: Muzea nokto en Svitavy. Post tagmanĝo komputila seminario, je 16h inaŭguro de la nova tutjara ekspozicio „125 de esperanto“ kun kultura programo, filmprojekciado, muzikumado, partopreno de programo en la Urba muzeo kaj galerio; ebleco de tranokto, dimanĉa ekskurso al Polička aŭ al la fontoj de la rivero Svitava. Info: dvor.libuse@seznam.cz

2012-07-01-14, 2012-07-15-28, 2012-07-29-08/10: Tri etapoj de la 59-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov apud Vranov-lago. Info: info@set-lancov.cz, <http://www.set-lancov.cz>

2012-07-10-15: La 18-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso en Opava kun la ĉeftemo „Depresio kiel kromefiko de kronikaj malsanoj“. Info: Eva.Kopecna@ivax-cz.com

2012-07-14-20: Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK en Svitavy. Tutsemajna aranĝo kun la temo „Sciencfikcia literaturo kaj robotoj“ kaj riĉa turisma kaj kultura programo. Info: www.kava-pech.cz/iek aŭ chrdle@kava-pech.cz

2012-07-21-29: Somera Esperanto-Studado. Aranĝo en Slovakio ideala por komencantoj, kun bunta programo. Nunjare denove en Nitra. Pli da informoj kaj aliĝilo ankaŭ en la ĉeĥa lingvo <http://cs.lernu.net/ses/>

2012-08-10-12: Renkontiĝo de iamaj partoprenintoj de Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov. Info: info@set-lancov.cz, <http://www.set-lancov.cz>

2012-09-13-16: La 6-a kongreso de AEH-IKEH (handikapitaj esperantistoj) en ripozdomo Štíří důl u Kruceburku (Skorpia valo ĉe Kruceburk). Info: aeh-ikeh@volny.cz

2012-09-27/30: Trilanda konferenco - Komuna konferenco de aŭstraj, ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj. Info: www.esperanto.cz aŭ komitato@esperanto.cz

2012-11-15-18: KAEST (Konferenco pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko), nunjare denove en Modra-Harmónia. Informoj kaj aliĝilo: <http://kaest.ikso.net/>

2012-12-08: AnkRo - Antaŭkristnaska renkontiĝo. Okazloko en Písek, Informoj: <http://www.esperanto.cz/eo/akce/ankro-anta-kristnaska-renkonti-o-484.html>

2012-12-29: Esperanta Silvestro en Česká Třebová

MIGRA EKSPozICIO „ĈU ESPERANTO ESTAS MORTA LINGVO?“

estos printempe vizitebla en la regiono Liberec:

2.-30.4. en Liberec – Vratislavice nad Nisou

3.-31.5. en Česká Lípa

4.-25.6. en Doksy apud la Lago de Mácha

ĈEĤLINGVAJ PRELEGOJ EN ESPERANTO-MUZEO SVITAVY

19.4. ekde 18:30 – Israelo sojle de la milito

28.4. ekde 14:00 – Pri bahaa kredo kaj pri temo de la lingva unueco

Ankaŭ neesperantistoj kore bonvenas!

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al miropiro2312@gmail.com (atentu la novan retadreson!). Ne eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

Atentu, ke la plej ampleksan kalendaron de Esperanto-eventoj en la tuta mondo, sed ankaŭ plurajn utilajn informojn, vi trovos ĉe www.eventoj.hu

8. BONDERIZOJ

Nome de la redaktokonsilio de ĈEA-retkomunikoj kaj ankaŭ propranome mi deziras al ĉiuj abonantoj de la ĈEA-retkomunikoj gajan Paskon.
Miropiro (Miroslav Hruška), redaktoro de ĈEA-retkomunikoj

ĈEA-RETKOMUNIKOJ 2012/1

Kontakto kun ĉefredaktoro: Miroslav Hruška – miropiro2312@gmail.com

Redakta teamo: Petr Chrdle, Pavla Dvořáková, Marek Blahuš